



# LA PACDEFENDANTO



N-o.48. NEREGULA INFORMA CIRKULERO POR ĈEĤOSLOVAKIO Decembro 1955

## NEGOCADO KUN LA MORTO

+++++ +++++ +++++ +++++ +++++

La plej terura "INTERNACIO"de l'homaro

De Erich GSCHWENDE

Sub tiu ĉi skuanta titolo la bonege fama aŭstria kulturrevuo "DIE ÖSTERRICHISCHE FÜRCHER", Wien, la 15.10.55, daŭrigas sian ne sufiĉe laŭ-deblan serion da artikoloj, kiuj kurage kaj senkaŝe malkovras la spiritaĵajn malsanojn de nia epoko kaj riskas diri la veron ankaŭ tre malagrablan, konŝciante, ke nur la vero liberigas la homon. Tiu ĉi arti-kolo meritas plej vastan diskonigadon en nacilingvaj jurnalaj. El ĝi ĉiu perfekte komprenas la kialon de diversaj rearmaĵoj, kiujn oni ka-ŝas antaŭ la ĉiamaj viktimoj de la tiel kaj tial eksplodigitaj mili-toj. H o m o j, p o p o l o j, v e k i g u f i n f i n e !!!

D-ro. Adolf HALB DL-Aŭstrio.

Kun la progreso de la teĥniko la ekonomio konkeris la estrecon super ĉiuj potencoj de la publi-ka vivo. Politike kaj politikistoj estas ĝiaj servantoj. "Negoco por ĉiu prezo" estas la plej supera lego de la ekonomia potenco. Por ĉia prezo okazu produktado kaj vendado. La prezo en la armilin-dustrio estas la morto. En la u-nua mondmilito -tiel oni kalkulis- la morto de unu soldato kostis cent mil germ. markojn, kies duon-on la armilfabrikistoj povis sur-konĉigi kiel netan profiton. Ĉiu dua minuto de la unua mondmilito "senpezigis" naŭ mortintojn aŭ 900 mil germ. markojn = 450 mil neta gajno de la armilindustrio. La dua mondmilito, kiu tutece etendigis ankaŭ super la civila logantaro, kostis multoblajn viktimojn, re-zultigis ankaŭ multoblan profiton de la armilindustrio.

igitaj kun ĝi nutras sin per arma-ita konflikto, de la milito. Eble ne tiel ĉefe malbona volo kaj intenco kiel la lego de la liberala ekono-mio kulpas, se la militindustrio es-tigas la konkuradon pri armado. La fakuloj asertas, ke ili respondecas ja nur pri la produktado de la ko-mercaĵo, ne pri ĝia uzado. Kun sama kontento ili okupas sin per la pro-duktado de pacaj komercaĵoj, kondi-ĉe, ke la "negoco" same gajnigas. Ke la militindustrio dependigas la ga-zetaron kaj politikon, ili senkul-pigas ankaŭ per la "negoco". Dum ja-roj la armadagento kaj grandakci-ulo de la militindustrio, Sir Basil ZAHAROFF, iam en Konstantinopolo dis-portinte en la bazaro komercaĵojn kaj fariginte Kavaliro de la brita Grandkrucro de la franca Honorlegio kaj honora direktoro de la univer-sitato Oxford, procesis kontraŭ la verkisto Robert WUMANN, kiu eldo-nigis libron pri la "Rego de ar-miloj".

Ligite al la ĉeffinancistoj la armilindustrio kreas trustojn kaj kartelojn, kiuj etendigas super ĉi-uj landoj, amikaj kaj malamikaj. Internaciaj arangoj, reciproka a-kiro de akcioj garantias, samal-tajn prezojn, konstantan aŭ bar-atan vendadon laŭ la diktado de malmulte da internaciaj firmaoj. la produktado de l armilindust-rio kaj de la ekonomiaj branĉoj

En ĝi estas demonstrita la kolo-sa influo de unu sola homo sur la sangano evoluon de la histo-rio.

Sed la "apartaj leĝoj" de la ekonomio certe povas esti estrat-aj de la homo.

antaŭ nelonge Šponholz en Hanover

eldonis libron kun la emociiga titolo "Geschäfte mit dem Tod - vom Maxingewehr zur Kobaltbombe"/Negocoj kun la morto - de la Maximpafilo gis la Kobaltbombo/, en kiu la verkisto Helmut HERDA malkovras la interrilatojn kaj kaŝmotivojn de la vetarmado antaŭ 1914, inter ambaŭ mondmilitoj kaj post la dua mondmilito, ĉerpinte el multaj en-kaj eksterlandaj fontoj. Rilate mal-multe da gigantaj societoj, kiuj estas kun-kaj interligitaj mastras la produktilojn de la milito, la "malnovan" kaj la "peratomon, novan militon". La "germana ekonomimiraklo", la Marshal-plano, la germana rearmado, la "armita neutraleco" de Aŭstrio kaj aliaj pliaj faktoj ek-havas ne tre afablan karakteron el la vidpunkto de la armadekonomio. Certe, pri la ekonomiaj interrilatoj, rezultintaj post 1945 ankaŭ her-da havas nur ŝparemajn fontojn. Sed surbaze de la faktoj gis la dua mondmilito eblas ekscii, kio okazas malantaŭ la kulisoj de la oficiala mondpolitiko.

La ĉefministro de Francio, Aristide BRIAND deklaris la 29.9. 1930 antaŭ la kunvenintaro de la Ligo de Nacioj:

"Neniu nacio, neniu registaro deziras la militon, sed multe da interesatoj laboras kontraŭ la paco. Ili laboras kontraŭ la Ligo de Nacioj, ili pagas la militirojn de la gazetaro, kiu senĉese vanigas niajn klopodegojn. Ili estas la fabrikoj de bataliloj kaj pafaĵoj. La artikoloj kontraŭ la paco estas skribitaj per plumoj, tranĉitaj el la sama ŝtalo, el kiu muldigas la kanoj kaj grenadoj."

Briand sciis iom pri la Internacio de la militindustrio, ĝiaj interligoj kaj plektecoj per karteloj kaj trustoj. Li vidis en la Internacion de la ĉefinancistaro, ĉar li jam mem komunikadis kun Zaharoff, kiu post la preparolado de la organizado de aermilito, kvazaŭ neĉefe donis al li per la mano maldekstra koverton kun la surskribo "POR SOLDATVIDVINOJ" kaj ĉekon por unu miliono da Frankoj. Briand mem rakontis ĉi tiun malgravan "neĉefaj-on" al Robert NEUMANN.

SCHNEIDER-CREUZOT, la plej granda armilfabriko en Francio, liveris antaŭ la unua mondmilito al Rusio, Germanio kaj al la landoj de la pli

posta "Malgranda Entento" VICKERS ARMSTRONG, la angla armilfabrikego posedis fabrikojn en Hispanio, Italio, Japanio kaj Kanado. Ĝi plej intime rilatis kun la germana armilfabriko Löwe und Comp. Membro de la familio Löwe estis direktoro de la VICKERS-ARMSTRONG administracio. Kun la firmao KRUPP Vickers disputis post la unua mondmilito pro patentoj, kio tiel finigis, ke Krupp ricevis kvitige/rekompence/ la hispanan fabrikon de Vickers.

Interesa ekzemplo de internacieco de la karteloj estis la internacie pulvokartelo. La NOBEL-DYNAMIT-TRUST laborigis sep filiojn en Germanio kaj unu en Japanio. Al ĝi apartenas tri eksplodigil-fabrikoj, kiuj estis kunplektitaj en la grupo Rhein-Siegen, la Rhein Rotweiler pulvofabrikoj, kiuj siavice kunlaboris kun anglaj, rusaj kaj hispanaj fabrikoj; la germanaj armil-kaj pafaĵfabrikoj, la Société Française de Dynamite kaj la Société Francorusse de Dynamite.

Nerektaj rilatoj ekzistis inter la plejgrandaj germanaj kaj francaj militindustrioj. La angla firmao Vickers-Armstrong donis monon al la kirasplafabriko "Mutoran" en Japanio kaj partoprenis ankaŭ la hispanan ŝipkonstruejon "Naval Konstruktion Establishments de Ferrol". Antaŭ la unua mondmilito ekzistis internacia interkonsento de la germanaj armil-kaj pafaĵfabrikoj en Berlino kaj Karlsruhe, la armilfabriko Mauser en Oberndorf, la Fabrique National d'Armes de Guerre en Herstal en Belgio, kaj la Aŭstria Societo por Armilfabrikado. Ĉi tiuj estis sindevigitaj al reciproka subteno pri la liverado de karabenoj, prezegalingo kaj divido de la profito. Ili liveris karabenojn al Rusio, Japanio, Ĉinio kaj Abesinio. Duboj de propraj politikistoj estis ĉiam kontentigitaj per la argumento: "Nur la negoco kun la eksterlando kapabligas la propran produktadon de armiloj".

POKKER konstruis flugmaŝinojn en Nederlando, JUNKERS en Svedio, DORNIER en Svisio, unue por la elektita hejmlando, por poste elspezigi la kapitalon por la konstruado de militaviadiloj, kio en Germanio estis malpermesita. Cete-

ne ne nuris prototoj de la  
transpreno de akcioj kaj kartel-  
inte konsentoj de la amerika kaj  
germana peza industrio. Ĉu ili  
scias, ke ili tiel favorigis la re-  
armadon de Hitler? Ĝi estis ne-  
goco, kaj tiu ĉi cirkonstanco mal-  
gravigas ĉiujn aliajn konsiderojn.

Ĝis 1940 171 amerikaj firmaoj  
investis en la germanan ekonomion  
420,6 milionojn da dolaroj! Per  
ĉi tio oni ekkomprenas la eks-  
terordinaran armadkapablecon de  
Hitler. Sub ĉi tiu aspekto la pro-  
ceso kontraŭ la heredintoj de  
Krupp en la kadro de la proceso  
kontraŭ la militkrimuloj impresas  
groteske. Ĉi estus devinta same  
akuzi antaŭ tiu tribunalo la mon-  
donantojn de Krupp, la New-Yorkajn  
bankojn Halgarten & Camp, Gold-  
mann, Sachs & Co, la National City  
Bank kaj aliajn kunhelpintojn.

Standart Oil Trust en New Yersey  
unu el la decidigaj petrolfirmaoj  
estas asociita al la amerika ban-  
ko J. Henry Schröder/fratoj Dulles/  
La amerika trusto havis en Hamburg  
filsocieton, la German-amerikan Pe-  
trol-Societon kun 18.000 disven-  
dejoj en Germanio. Malmulte konata  
estas la ligiteco inter Standart-  
Oil kaj IG-Farben-Industrio. 1925  
la germana ĥemiindustrio kunigis  
en la namutajo de IG-Farben, kiu  
ampleksis ankau la partoprenon de  
Bayer-Werke en Wintrop Chemical  
Company kaj la kunlaboron kun la  
ĉefa USA-militindustrio. Jam pli  
frue Bayer-Werke akiris la duonon  
de la akcioj de Wintrop Chemical  
Company, filsocieto de Sterling -  
Produkts. La Sterling-Produkts-  
grupo faris kontrakton kun la pl-  
aj granda amerika entrepreno, la  
Du Pont-entreprenaro, tiel ke re-  
zultis la nereakta kunlaborado de  
Du Pont kun IG-Farben.

Ĉi tiuj negocaj interligoj kaj  
dependoj atingas en la duan mondm-  
iliton. Raporto de la administra  
direktoro de Standart Oil, Frank  
A. HOWARD de la 12.10.1939 grave  
klarigas ĉi tion. Kiam la German-  
oj jam invadis Polion, Howard vo-  
jagis Anglion, por tie interpari  
li militajn liverojn, al la ang-  
la kaj franca armeoj. Ĉi tio ne-  
malhelpis lin, ion pli poste en  
Nederlando dum tri tagoj inter-  
trakti kun reprezentantoj de IG-  
Farben kaj aranĝi "Gentlemen's  
Agreement": "Ni transdonis al ni

okumentojn de la transdono de  
2.000 patentoj kaj ni faris nian  
plej bonan, por ellabori ampleks-  
ajn planojn por "Modus Vivendi"  
/agebligan manieron/, kiu devis  
esti ĝipa dum la milito, ĉu USA  
jes aŭ ne partoprenos la militon"

La sfero de la interesoj estis  
nove distribuita por la tempo de  
la milito: Al Standart Oil apart-  
enis la disvendado en USA, en la  
Brita Imperio, en Francio kaj ĝiaj  
kolonioj kaj partoj de la Meza O-  
riento. La disvendado en la ceteraj  
teritorioj apartenis al la IG-  
Farben. Parto de la akcioj de Stan-  
-dard Oil posedadoj de IG-Farben  
redonigis la 2.11.1939 al la ame-  
rikaj akciantoj de Standart Oil.  
Sed ĉi tio ne tuŝis la faritan  
interkonsenton. IG-Farben malperdi-  
is siajn patentojn kaj la rajtojn  
pri licencpagoj, kiuj devis bilanc-  
-igi post la milito. Kiam en 1952  
direktoro Howard estis publike at-  
-takita pro tiu amika solvo, li sim-  
-ple deklaris: "Kiel ajn la sentoj  
de la kontraktantoj estas, milito  
tamen ne malvalidigas tiajn kon-  
-traktojn. Ĝi nur interrompas ilian  
-validecon." Kaj la ĵurnalo de Wall  
-street retrankviligis la publikon:  
"Nia lando estas nun la heredanto  
de la malfordita imperio de IG-  
Farben-Industrio kaj intencas, ĝin  
konservi por si".

Post la dua mondmilito la mal-  
nova ludo redarigis. Iau informoj  
de angla gazetaro jam en 1947 de-  
-nove ekzistis pli ol 100 grandaj  
germanaj industrioj, kiuj, ki-  
-es akcioj apartenis pli ol 50 %  
al amerikaj bankoj kaj trustoj.  
En centoj da firmaoj la Amerikan-  
-oj partoprenas kun 15-30 % de  
la fundamenta kapitalo. En 1949 la  
ĉefministro de Sud-Badeno konsta-  
-tis, ke en la industrioj de la lan-  
-do eksterlanda kapitalo estas re-  
-prezentata per jenaj partoj: 99 %  
en la ĥemiindustrio, 46 % en la e-  
-lektroproduktado, 83 % en la teks-  
-industrio, 46 % en la paperindust-  
-rio, 45 % en la lignoindustrio kaj  
81 % en la filmindustrio.

La granda amerika militindust-  
-rio Du Pont konstruigis la unuan  
-fabrikon de atombomboj. En 1915  
-gi laborigis 4000, 1918 jam 50.000  
-kaj hodiaŭ en 72 fabrikoj pli ol  
-85.000 homoj, inter ili 2.000 sci-  
-encistoj el 35 landoj. Ĉi tiu in-  
-dustriaro estas opiniata kiel la

plej granda liveristo de pafadoj. Ĉu la respondeculoj de tiu ĉi armilforgejega faros negocajn konsiderojn, kiuj devus al ili malpermesi la produktadon de atomarmiloj? La atomarmiloj signifas la sinekstermon de nia tero. Ankaŭ la armilfabrikistoj ne postvivos, se la H-bomboj estos uzitaj. Alfredo NOBEL deziris per la transpontiga fondo de sia Nobel-premio iel rebonigi la malbonaĵon, kiun lia dinamito povis fari. En tio li ne prosperis. Li ne povis evitigi la misuzon de sia invento dum milito. Ĉu la granduloj de la militindustrio malhelpos tiun misuzon, se ili laudas la pacan utiligon de la atomenergio? Pri la danĝero de levangoj, inundoj, tertremoj kaj tempesto la registaroj akordigas, ke la homoj ne rajtas havi plej grandan sekurecon. Rilate al la minacoj de la atomarmiloj - tiu infera produkto el mano homa, ĉiuj internaciaj unuigoj malsukcesas. Ekzistas eta espero, ke la Internacio de la Militindustrio, kiu tiel decidige influas la mondpolitikon, pro "negocaj" konsideroj finigos la vetarnadon kun atomarmiloj. Ĉar finfine per tiu ĉi "negoco" oni ne plu povos profite negociadi.

Sed, ni esperantistaj pacdefendantoj certe ne kredas je tiu "eta espero" ke finfine la atomfabrikantoj prudentigos, sed ni firme kredas, ke la generala volo de la homaro devigos siajn registarojn, aŭ starigos tiajn registarojn, kiuj akceptos internacian kontrolkomisiaron, kiu gardus kaj malpermesus ĉiun ajn misuzon de la atomenergio jam komencante ĉe la uranminejoj.

R. BURDA.

### "GUTO POST GUTO"

Ni ĉiam guto post guto traboras la indiferentecan de kompetentaj personoj. La interkorespondado kun aliaj landoj daŭre vastigas. Nun ni jam havas sufiĉajn informojn pri la Esperanto-movado en la tuta mondo. En la sov. revuo "NOVA TEMPO" n-o. 46 aperis, ŝajnas, la unua raporto de membro de angla parlamento Enris Hjus pri sia vizito en Leningrado, kie juna esperantistino al li pli helpis ol la

scienculo angla kaj franca lingvoj. En la revuo "ALILANDA LITERATURO" n-o. 5 kredeble aperos artikolo pri la Belonja Esperanto-kongreso. Nia grupo kunvenadas regule en la Lingvosciencia Instituto de Mosvo.

S. SARIČEV.

### NAŬTOJ INTERAMIKIĜAS PERE DE ESPERANTO

La hungara "EACO" Esperanto Rondo de la Kulturhejmo en Budapeŝto aranĝis la 24.11.1955 Finnland-Hungaran Amikecvesperon. Al tiu vespero kontribuis la Ĉek. Finnlanda Pakaĵkomitato per lumbildprelego pri la finlanda pacmovado. Estis prezentitaj ankaŭ diversaj pejzaĝoj, kiujn akiris k-do Pál Balkányi dum sia Finnlandvojaĝo. K-do. Imre Ferenczy recitis hungare la Finnlandkanton kaj ankaŭ poemojn de d-ro. K. Kalocsay. Inter finnlanda kaj hungara flagoj flirtis la esperanta, simboligante la amban popolan interfratigon pere de nia internacia lingvo. La murojn ornamis finnlantaj pacafiŝoj, ricevitaj de k-do. Niilo Kavenius, redaktoro en urbo Turku.

El la sukcesplena vespero estis sendita salutletero al la finnlanda ambasadoro en Budapeŝto kaj al la Finnland-Hungara Societo en Turku kaj al la gazeto Uusi Päivä. Pri tiu ĉi vespero raportos ankaŭ la Hungara-Radio en sia finnlanda relacio. Pál Balkányi.

### BELIGA EKZEMPLO

#### DE INTERNACIA SOLIDARECO

La 3. de decembro atingis nian redakcion letero de sovjetarmenia k-do. Simon MKRTIČJAN, kiu vere profunde emociis nin, kaj ne povas aliel, ol prezenti gin ankaŭ al niaj legantoj. Inter aliaj sciigoj k-do. S. Mkrtičjan skribas:

"- - - Hieraŭ vespere vizitis min k-do. Gurgen SEVAK kaj T. F. ambaŭ esperantistoj. La temo de nia interparolo estis inter aliaj, la financa stato de "La Pacdefendanto", al kio estis dediĉita via ĉefartiĉkolo en la n-o. 45. de la revuo. Ni triope faris donacon por kovri la elspezojn de "La Pacdefendanto", sume 250 rublojn, kio lau hodiaŭa kurso egalas 450.-kės.

La donacintoj:

Prof. d-ro. Gurgen SEVAK... 115 rb  
K-do. T. F. .... 20 rb  
Simon MKRTIČJAN... 115 rb

Prof. dr. Gergan Sova. . . . . 115 rb.  
K-do T.P. . . . . 20 rb.  
Simon Mkrtičjan. . . . . 115 rb.

sume = 250 rb.

Ĉar pro valutaj malfacilaĵoj la sumon 250 rb. ni ne havas eblecon sendi al vi, ni deponis ĝin hodiaŭ en ŝparkaso de Eŭeran No. 5654, konto n-o. 18519 je 2 %.

Mi petas vin komuniki, kiam ni ere sendi al vi tiun sumon. Ĉu vi havas financajn rilatojn kun Moskvo, aŭ kun ĉeĥoslovaka reprezentanto komerca en Moskvo?

Salutante vin sincere, ni atendas vian respondon.

Simon Mkrtičjan  
EREVAN, Sovjet-Armenio  
NIA RESPONDO:

Karaj kamaradoj!

Kvankam ni tre bezonas monon, ni tamen ne volas serĉi vojon kiamaniere akiri vian afablan donacon. Sed plejprofunde emociis nin via decido, tio estas decido de sovjetaj kamaradoj, helpi al nia organo, ĉar per tia decido vi esprimas vian koran solidarecon kun nia batalo kaj egan simpatiecon al nia organo. Tiaj esprimoj estas por ni multe pli valoraj ol ĉiu mono, ĉar ili nepre devas doni al nia anaro pluan entuziasmon kaj fortan energion, per kiuj ni fine atingos nian celon kaj definitivan venkon. Akceptu karaj kamaradoj nian plej sinceran dankon por via sincera volo kaj se vi nepre volas helpi al ni, ĉu konservu la donacitan monon ĝis kiam vi sukcesos eldoni propran literaturon, kaj tiom vi helpos al ni per ĝia alsendo.

Komprenu, ke LA PAŬDEFENDANTO estas santepe ankaŭ via organo kaj informilo kaj ni ĝoje ĝin liveras senpage al vi, ĉar ni konscias pri tio, ke frue aŭ pli malfrue ankaŭ la sovjetaj kamaradoj eldonos sian propran gazeton kaj literaturon. Tio signifos por ni la plej erikan rekompencon. Intertempe ni forte kredas, ke niaj ĉeĥoslovakaj esperantistaj paŭdefendantoj inter si mem kolektos tion da fortoj, por povi vivteni nian movadon. Vivu la internacia solidareco en nia komuna batalo!  
H. Burda.

## ESPERANTO EN SOVJET-LATVIO

Je ni en Latvio ankaŭ la Esperanto-movado ĉesis sian letargion. Kvankam ne multaj, sed tamen kelkaj el la malnovaj esp-istoj esperas, ke ankaŭ ĉu ni oni oficiale permesos organizon de Esp-grupoj kaj societoj. Ni kontaktas kun k-do Bokarev, la plej eminenta persono, kiu povas fari por nia movado. Konstatante, ke io jam okazas, ni petas vin soligi al ni kial estas la afero ĉu vi kaj en la ceteraj Popoldemokratioj. Ni fariĝis esperantisto en

la jaro 1909. Ĝis la j. 1941 ni estis kunlaboranto de sveda Esp-gazeto "ARBEJAR ES PERANTISTEN". Dum pli ol 5 jaroj ni liveris por ĝi tradukojn el latva literaturo, ĉefe de progresemaj verkistoj. Ankaŭ nun ni havas manuskriptojn de rakonto kaj romano de verkisto V. Lācis/nia ministro-prezid./krom aliaj mallongaj tradukaĵoj. Okazo de ebleco ilin publikigi, ni ilin senkondiĉe disponigos al vi.

Ĝis la jaro 1941 nia entrepreno havis Esp-grupon "LA VERDA ĜERMO", kiu likvidiĝis kune kun aliaj privataj societoj. Laŭ nia opinio la aktiveco de esp-istoj en nuna tempo certe renkontos bonvolemon de oficialaj instancoj. Ni bezonus ricevi favorajn raportojn por diskonigi ilin inter niaj laborkamaradoj kaj verbi novajn adeptojn por nia movado. Teodors ARBERGS Liebalgs iel. 1-2, RIGA-Ĝ, Latvio-U.S.R. Sovjet-Unio.

## KONSERVATIVULOJ ĈIRKAŬ

K-do BOKAREV

Kiel entusiasmulo k-do Bokarev faras kaj agas tre fervore por Esperanto, sed ekzistas ĉirkaŭ li kelkaj konservativaj scienculoj, kiuj, gvidante sin per iuj starigitaj dognoj, staras kontraŭ Esperanto. Komprenble la rado de la historio ne reiros malantaŭen; frue aŭ pli malfrue la ideo de internacia lingvo venkos solene, kaj sovjetaj esperantistoj povus montri sin dece.

Ni ĉiu tage atendas la legaligon de nia movado, sed tio ne signifas, ke ni nenion faras por Esp-o. Ekzemple en Erevan/Sovjeta Armenio ni faras propagandon por nia internacia lingvo, kiu estas tre

varme akceptata de gejunuloj. Dufoje en la semajno ni kunvenas en hejmo de tiu au alia kamarado, diskutas problemojn de nia estonta organizo, legas ricevitaĵajn Esp-gazetojn kaj serĉas vojon kiel akiri kunvenejon por niaj samideanoj kaj simpatianoj. Sekve de tiaj kunvenoj jam estas organizitaj kelkaj kursoj, kiujn partoprenas ĝis 15 gejunuloj.

S. Mkrtiĉjan.

UHBSPR HUUZU4BU8U8U8

### A V E T I K I S A H A K J A N

La 27. de okt., okaze de la 60a datreveno de naskigo de eminenta armenia poeto Avetik ISAHAKJAN estis aranĝita en la Erevana ŝtata universitato jubilea vespero. Ĝi vesperon partoprenis la jubileulo A. Isahakjan, rektoro de la universitato k-do G. Petrosjan, multaj profesoroj, gestudentoj, verkistoj kaj aliaj gastoj. Post prelego de Isahakjan kaj finvortoj de la jubileulo okazis literaturna programo, kiun partoprenis eminenta armenia esperantisto, eksmembro de la Esperanto Lingva Komitato, prof. d-ro G. G. Sevak. kiu deklamis esp-lingve ĉapitron el la poemo "Abu-Lala Mahari" de A. Isahakjan kun granda sukceso.

En armenlingva jubilea n-o. de erevana universitata gazeto "EREVANI HAMALSARAN" eblas legi artikolon, ke jam en 1926a jaro aperis en Leibzig la poemo de A. Isahakjan "Abu-Lala Mahari" en Esp-traduko de prof. G. Sevak kaj pli poste el Esperanto ĝi estis tradukita en hebrean kaj japanan lingvojn.

K-do. prof. G. Sevak intencas eldoni en Erevan libretojn el la serio "Armenia Literaturo", el verkoj de famaj poetoj H. Tunkanjan A. Isahakjan kaj B. Carene.

Prof. Sevak ekkontaktis kun la prezidanto de la Armenia societo por kultura interligo kun eksterlando. Ĉe lia unua vizito la prezidanto interesigis pri Esperanto kaj petis lernolibron. Li diris: kiam en eksterl. delegitaroj vizitontaj Armenion trovigos esperantistoj, li petos nian helpon. Karaj gek-doĵ! mi salutas vin

en la nomo de armeniaj pacamiko-koj esperantistaj kaj deziras al vi neelĉerpeblan energion por nia kara celo.

Simon Mkrtiĉjan  
U. Gukasjan 19, EREVAN, Sov. Armenio.

### E L B U L G A R I O

Goce Delĉev, la 1.12.55. Antaŭ kelkaj tagoj malfarmigis Esp-kurso por komencantoj. Partoprenas pli ol 30 gelemnantoj. La kurson mem mi gvidas.

Akceptu miajn plej korajn salutojn kaj bondeziraĵojn al la nova 1956a jaro. Ni esperu, ke ĝi estos plej favora por nia movado!

B. A. VELEV

### VIDANTOJ HELPU AL BLINDULOJ!

La Ligo de Ĉeĥoslovakaj Invalidoj en Praha/CSR/ eldonas brajle presitan organon "AŬRORO". Ĝi estis fondita en 1920 kaj estas unu el la plej malnovaj Esp-gazetoj. Ĝia aperado estis interrompita nur dum la milito. Depost 1945 ĝi daŭre kaj regule aperas kaj eĉ sukcesis transvivi la periodon de malfavora sinteno kontraŭ Esperanto, kiam ĉiuj ceteraj Esp-gazetoj en Ĉeĥoslovakio ĉesis aperi. Nun aperas ĝia 29a jarkolekto.

Dum la tempo de sia ekzisto ĝi akiris pro sia persista kaj konsekvenca porpaca tendenco multajn fidelajn kaj fervorajn amikojn por Esp-o, por la paco kaj por la malfacila laboro de ĉeĥoslovakaj samideanoj.

"AŬRORO" aperadis 5foje jare po 150 ekz-oj, sed ek de 1956, la eldonkomitato decidis pligrandigi ĝian eldonkvanton, aperigi ĝin 6foje jare kaj liveri ĝin al ĉiuj eksterlandaj esp-blinduloj tute senpage, kiuj sendos al ni siajn adresojn. Tiu fakto certe instigos vin, diskonigi ĝin al ĉiuj blinduloj, kies adresojn ni ĝis nun ankoraŭ ne posedas. Tre volonte ni sendas ankau al vi provokz., kiun vi povas uzi por ekspozicioj.

Ni sincere antaŭdankas al vi pro via bonvola helpo kaj salutas vin

Nia adreso:

"AŬRORO", Slepická knihovna,  
Krakovská č. 21, P R A H A - II.  
Ĉeĥoslovakio.

## GIS LA REVIDO EN SOFIO !

Post unuonata tre agrabla, utila stultovojago tra via lando per Esp-o mi revenis Sofion. Vi legis jam detalojn pri mia vizito en apartaj urboj. Mi vizitis Plzen, Praha, Kladno, vilagon Lidice, Pardubice, Hradec Králové, Brno, Olomouc, Ostrava, Karvíná, Opava, Otrokovice, Gořtvaldov k. Bratislava en Slovakio. Ĝie esperantistoj min renkontis kaj helpis al mi pli ol mi supozis. Dank al ili mi vidis multajn geografiajn objektojn, kio havas por mi, geografisto, altan signifon. En la sama sen-co al mi tre helpis la urbestroj de Hradec Králové kaj Brno. Ili eĉ per automobilo veturigis min. Urbestro de Pardubice persone montris al mi la faman fabrikon "PARDUBICKÝ PERNÍK". En Plzen dank al k-do. Burda, Reiser kaj d-ro. Černý mi sukcese povis rigardi la industrion de la urbo. En Praha dekoj de gekamaradoj/O. Ginz, T. Pumpr, Vitek, J. Holá, M. Kšenková, d-ro. Jernář k. aliaj helpis al mi viziti la plej vdiindajn lokojn de ilia ĉefurbo. En Pardubice preskau la tuta Esp-klubo min akompanis kaj helpis. Neniam mi forgesos ilian fratecan sintenon, kaj precipe de d-ro. Hrubeš, gek-do. K. Franc, Stechr k. a. En Hrad. Králové verdpostenis k-do. Zd. Hršel, en Brno k-do. Vondroušek, Frídrieh, Kořínek, Šikula, Zink, Ballay k. a. En Olomouc k-do. d-ro. Vlad. Mohapl, M. Rudolf, Nadežda Pokorná, en Ostrava k-do. Lička kaj Kočvara, en Otrokovice k-dinoj. Fan Matušova, Evjáková kaj en Bratislava k-do. M. Zvěra k. P. Rosa.

En ĉiuj urboj ni aranĝis Esperanto-kunvenojn. Publikaj prolegoj pri "Konstruaĝo de socialismo en Bulgario kaj ĝia batalo por la paco" okazis en Plzen, Hradec Králové, Brno, Olomouc, Ostrava, Otrokovice k. Bratislava. Pri mia vizito ĉe k-do prof. Trávníček en Brno, mi nur deziras mencii: En la fino li konsentis, ke Esp-o povas esti helpa internacia lingvo kaj eĉ bondeziris sukceson al nia Esperanto afero.

En Olomouc la rektoro kaj profesoroj de la Pedagogia Altlernejo post interparolado promesis klopodi malfermi Esperanto-katedron por gestudentoj.

En Bratislava mi vizitis la Centran Komitaton de la Slovaka Sindikata Konsilantaro/2hor. I disputis. Mi invitis ilian reprezentanton ĉe-

esti renkontigon en la Centra Komitato de la Slovaka Komunista Partio. Tie la diskuto dauris unu kaj 1/2 horon. La k-do. estis plej parte entute ne informitaj. Kiam ni klarigis kaj respondis iliajn demandojn, ili konsentis. Ekzistas ĉe ili komprenemo.

Mi esperas, kemia vizito helpis al la Esp-movado en via lando. Mi bedaŭris, ke mi jam ne povis viziti pliajn slovakajn urbojn kaj regionajn urbojn kiel, Liberec, Ústí, Karlovy Vary kaj České Budějovice.

Radio-Bratislava min intervjuis pri miaj impresoj el Ĉeĥoslovakio. Mi respondis en Esperanto/5 min./

Koncize: Mi estas tre kontenta pro la frateca akcepto kaj mi klopodos estonte respondi sammaniere.

Al ĉiuj esperantistoj mi diras: Ĝis la revido venontjare en Sofio dum la 32a Bulgara Esperanto Kongreso !

Canko MURGIN.

K-do. Burda demandas, ĉu la bulgaraj gek-do. ankau senpage gastigos nin kiel ni faris dum nia TUTSTATA al eksterlandaj gastoj en Otrokovice?

## EPIKA PROPAGANDO POR ESP-O.

Helpe de nia MEM-peranto k-do. A. Opisso el Genova, ni ricevis grandan ĵurnalon de la Federazione Italiana de Partito Socialista, "IL LA VORO" de 1/11.55. en kiu ni legas sur la 3a pago italan tradukon de la "Alvoko de ĉinaj scienculoj por Esperanto", publikitan en L.P. kaj aliajn raportojn favorajn al Esperanto, kiujn redaktis k-do. G. Barni.

Certe tiaj raportoj en ĵurnalo, kiu estas amase legata multe kontribuas al nia movado. Necesas, ke ankau aliaj gek-do. klopodu tiel fari.

La red.

## MENDU - MENDU - MENDU !

Du plej belaj arioj kaj du duetoj el la fana ĉeĥoslovaka opero "LA VENDITA FIANCINO" de Bedřich SMETANA aperis en Esperanto. Dank al s-ano Zdeněk Svěhla, tenora operkantisto, d-rino Královcová, soprankantistino kaj s-ano. Fr. Panes, pianovirtuozo, ĉiuj membroj de la opero en Olomouc, aperis du grandfondiskoj kun tiuj juvelmelodioj. La diskoj estas dediĉitaj al la Esperantofako de RADIO-ROMA kaj al UNESCO okazo de la unujara jubileo de la historia ponesperanta rezolucio. Sendu ilin al viaj eksterlandanikoj. Mendu ĉe: Mil. RUDOLF, Wlaslova 14. OLMOUC.

GRANDA SUKCESO EN KRAKOVIO

La krakovia grupo de la Esperanto Asocio en Pollando malfermis elegantan vesperan kurson, al kiu aligis 109 gelnantoj. Inter ili du -ono konsistas el gestudentoj. Por veki ankoraŭ plian entusiasmon la kursgvidantoj decidis tuj interligi siajn lernantojn kun eksterlandaj gesamideanoj. Por tiu celo bonvolu sendi bildkartojn kun indiko de via adreso, sekso, ago kaj profesio al: K-do.ing. Tadeusz LUKIEWICZ, Pl. Mariacki 7/4, KRAKÓW, Polio.

R. Rauczynski, prezid.

AL NIAJ ABONANTOJ

Malgraŭ kelkaj seriozaj klopodoj ni ne sukcesis trovi inter niaj anoj k-don, au kolektivon, kiu pretus senpage au almenaŭ por malalta rekompenco multobligi nian cirkuleron en la jaro 1956a. Por la distribuado aligis kolektivo de k-do. kanoniko A. Maczek en Mikulov, kiu tre verŝajne eldonos kaj distribuos la Pacdefendanton sub la firmo de la Distrikta Packomitato en Mikulov. La kolektivo faros tiun laboron en libera tempo senpage.

KONSEKVENCO DE NIA OPORTUNISMO

Estas, ke la redakcio devas plialtigi la prezon de la jarabono por 1956 je 16.-Kĉs por LA PACDEFENDANTO kaj ankau por la organo de MEM, "FACO" je 16.-Kĉs.

Ni kredas, ke tiu ĉi negranda plialtigo de la abonprezoj ne kaŭzos perdon da abonantoj. Vi devas kompreni, ke absolute ne eblas labori daŭre kun deficitto. Ne temas nur pri la eldonado de nia bulteno, sed la gek-doĵ el nia tuta lando konsideras samtempe la redakcion kiel centran konitaton de ĉehoslovakaj esp-istaj pacdefendantoj kaj turnas sin per ĉiuj petoj kaj konsilpostuloj al ni. Tio signifas, ke ĉi -u tage anasigas dekoj da leteroj sur la tablo de la redakcio, kiujn necesas laŭ ebleco kaj ilia graveco respondi. Kun la daŭra kresko de nia movado kaj plinombriĝo de niaj abonantoj ankau tiu korespondado kun ili ege disvastigas kaj konsumas respektindan sumon de la administraciaj enspezoj. Krom tio vi devas scii, ke ni liveras al kelkaj aliaj landoj nian bultenon tute senpage. Multaj el vi diros:

Tion vi ne faru. Sed al ili ni devas respondi, ke tio nepre necesas, ĉar eĉ se tio momente ne rentumas/laŭ komerca vidpunkto/, en la proksima estonto ĝi tamen multobligite redonigos al ni.

Inagu ekzemple: ĉu estas neceso, ke ni nun kelkan tempon helpu per nia gazeto informi kaj instigi niajn gek-doĵn en Sovjet-Unio, Ĉinio au Vietnamo al aktiveco kaj fondo de Esp-movado en iliaj landoj? Certo ke jes, ĉar ili nen ankoraŭ estas malfortaj. Sed pere de nia helpo ili baldaŭ kapablos eldonadi proprajn gazetojn kaj literaturon, same kiel jam Folio kaj Bulgario faras, kaj tiam al ni ĉio rekompencigos. Certe ĉiu el vi konsciigas, kion signifos por ni ekzemple la fondiĝo de Sovjet-Unia Esperanto-Movado kaj ricevo de sovjeta Esp-literaturo. En tiu senco ni devas esti solidarecaj kaj kapabli elteni la ionete malagrablan situacion, kiu finfine al nia movado ja nepre alportos cent-oblan rekompencon. Rud. BURDA

KORESPONDI DEZIRAS :

K-do. Leopold PETERA, poŝt. schr. 55 DVŤR KRÁLOVE n/Labem, Ĉehoslovakio Pri paĉnovado kun ĉiuj landoj. Interŝangas afiŝojn, bildojn kaj spertojn pri kuracigaj plantoj. Li ĉion rekompencos kaj cert. resp. K-do. Todor MARINOF, str. "Stefan Karadĝa" No. 9, BURGAS, Bulgario, interŝangas il. p. k., gazetojn kaj p. m. kun ĉiuj landoj.

K-do. Spas POPOF el PAZARĜIK, Bulgario kune kun sia edzino tutkore salutas siajn amikinojn Zavorková Olga el Most kaj Vedunka Knínková el Liberec kaj deziras al ili mult-tan feliĉon en la nova jaro 1956. K-do. Spas POPOF, Benkovska No. 82, PAZARĜIK, Bulgario, serĉas por sia grupo korespondantojn el ĉ. landoj. Respondo garantiata.

K-do.ing. Tadeusz LUKIEWICZ, Pl. Mariacki 7/4, KRAKÓW, Polio, serĉas korespondantojn por 109 gelnantoj. Indiku vian adreson, sekson, agon kaj profesion. Respondo certa.

20.000 pacpropagandaj

leter-koverttoj kaj paperoj estas al via dispono. Mendu tuj ĉe k-do. J. REISER, Kraj. správ. Spoĵů, PLZEN!



NIA MOVADO EN ĈEĤOSLOVAKIO

OLMOUC, la 23/12. vizitis nian urbon prof. C. Murgin el Sofio. Li estis gastigita de nia Esp-rondeto. Liajn prelegojn partoprenis ankau esp-istoj el Kroměříž, Přerov, Holešov, Lanžhot kaj Gottwaldov. Ĉeestis la direktoro de la nacia entrepreno "SVIT" en Olmouvice, oficialaj reprezentantoj de la Nacia Komitato, de la Komunista Partio, prez. de Ĉehosl.-Soveta Amikaro, parlamenta deputito kaj membroj de nia uzina klubo. K-do Murgin informis ilin pri la evoluo de la socialista konstruado en Bulgario. Li akcentis, ke dum sia vojago tra CSR li vizitis ĵan tutan vicon da urboj kaj ĉie lin afable akceptis Esp-rondetoj Tradukon de liaj prelegoj prizorgis k-do. instruisto Omelka.

TRINEC, dimanĉo la 4/12. okazis en Trinec laborkunveno de Esperanto rondetoj el la regionoj de Ostrava kaj Olomouc en la Sindikata uzina klubo "ZVMM". Pri la evoluo de pacaj rilatoj prelegis k-do. prof. J. Kožený el Kutná Hora. PRAHA, la 23/11. prelegis en nia klubo k-do. R. Burda el Plzeň pri la internacia esp-pacnovado. Lia parolado estis kun intereso akceptita. Fine li starigis proponon, arangi la II. Tutŝtatan konferencon de esp-pacdefendantoj dum 1956 en Praha kaj se eble ankau la II. Internacian Renkontigon de "MEM". Pro tro progresinta tempo tiujn proponojn diskutos la klubakomitato.

KARLOVY VARY, ĉi tie funkcias rondeto de Esp-junularo kun 13anoj ĉe la "Ruga Angulo" de Lázenské Dvory. 3anoj lernas Esp-stenografion lau Herold-wikulík. En Žukov ŝtato ni ekspozicias en bela vitrinkesto propagandan kaj informan materialon.

MOST, funkcias kurso kun 15 lernantoj, kiujn instruas k-dino Sacklová lau Ĉo-metodo. La ministra klubo presigis afiŝojn por nova kurso. Sur Náměstí Míru/Pacplaco/ni instalis novan propagandvitrinon. Nia junularo kunvenas ĉiu marde en Hornický Klub po 8-12 membroj de la 19a horo.

OSTRAVA, la 19/11-21/11. ni gastigis prof. C. Murgin el Sofio. Kron la karboninejoj li vidis ĉiujn

interesajojn de nia industria urbo. Okazis bona vizitita klubvespero kun interesa prelego de k-do Murgin. Dum 20 minutoj diskutis k-do Murgin kun nia urbestro, kiu tre favore rilatis al Esperanto. BOHUMÍN, ĉe nia fervoj-uzina klubo funkcias kurso kun 20 lernantoj. Instruas k-do. Vl. Slaný.

OSTRAVA-HULVÁKY, ĉe Kleriga Konsilantaro funkcias ĉiu ĵaude de 18. horo kurso kun 15 lernantoj. Instruas k-do. Vlad. Slaný.

DOLNÍ BLUDOVICE, en la 8jara meza lernejo de Klement Gottwald instruas ĉiu sabate al 34 infanoj k-do. instruisto Oldřich Schwetter post sia deĵoro.

VSEBOR distr. Chab, lernejdirektoro k-do. Jar. Klement sukcesis dum naci-lingva instruado instigi 14 infanojn inter 9-10 jaroj al lernado de Esp-o. Dum libera tempo ili kunvenadas kaj li persone ilin instruas. Tion bonvolu aliaj geinstruistoj imiti!

OPAVA, la 21/11. vespere niaj k-do alveturigis el Ostrava k-don. C. Murgin al nia urbo. Kron la Esper. klubon li vizitis la Distr. Nacian Komitaton, urban bibliotekon kaj aliajn gravajn instancojn. En Hradec ĉe Opava ni montris al li la muzcon. Lia vizito grave kontribuis al nia movado.

OLMOUC, la 7-8. de januaro 1956 okazos en nia urbo laborkonferenco de Esp-rondetoj el la regionoj de Ostrava kaj Olomouc. Tre verŝajne ni akiros 50% vervojrabaton. Venu multnombre! Aligojn sendu al k-do d-ro. Vl. Mohapl, Tr. Svornosti č. 4, Olomouc.

La vizito de prof. C. Murgin en nia urbo estis tre sukcesa kaj multe helpos al nia movado. Tuj la duan tagon ni vizitis la urbestron, kiu k-don. Murgin tre afable akceptis kaj per aŭtomobilo, akompanato de spec. fakulo, estis al li prezentitaj ĉiuj specialaĵoj de nia urbo. Vespeŝe okazis solena klubvespero, kiun ĉeestis ankau de-logitoj el Přerov kaj Rýmařov. La 18/11. k-do. Murgin akompanita de nia sekretarino vizitis la Regionan Nacian Komitaton, kie fakuloj lin informis pri la ekonomia stato kaj planado. Vespeŝe estis publika kunveno kun prelego en

nia universitata biblioteko. Ni ankau vizitis la prezidantaron de la Regiona Fakkomitato kaj invitis ilin, sed neniu alvenis kaj la Fakkomitato eĉ ne akceptis nian proponon rilate speciala renkontigon kun prof. Murgin. Sabate C. Murgin vizitis la pedagogian altlernejon, kie li rilatis kun kelkaj profesoroj kaj la rektoro de la altlernejo kaj vekis favoran intereson por Esperanto. K-do. rektoro, prof. Bělič eĉ estas ema trakti pri kreo de Esperanto lektorato en la altlernejo. Komprenoble, ni pri tio daŭrigos rilati kun li. Se ni sukcesus havigi al ni pli da tiaj eksterlandaj vizitoj, certe nia situacio rariĝos pli favorigita.

BRATISLAVA, publika prelego de prof. C. Murgin okazis en nia klubo de la Kleriga Domo. Ĉeestis 50 personoj, el tiuj 30 estis esperantistoj. Partoprenis la direktoro de la Kleriga Domo kaj la bulgara vickonsulo el Bratislava. Tradukis k-do. P. Rosa. Por la prelego ni propagandis per afiŝoj, persona invito kaj urba radiodisaŭdigo. Post la prelego estis aparta kunveno de esperantistoj. K-do. Murgin en akompano de k-do. Tvaroŝek vizitis la Slovakian Sindikatan Konsilantaron, kie ili diskutis kaj kelkfoje eĉ disputis. Ili estis kontraŭ Esp-o., sed Murgin ĉion trafe klarigis tiel, ke fine iliaj argumentoj elĉerpigis. Akompanata de k-do. M. Zvára, Murgin vizitis ankau la kulturelan fakon de la Centra Komitato de Slovaka Komunista Partio, kie la interparolado daŭris ĉirkaŭ 100 min. Oni stariĝis komplikitajn demandojn, sed Murgin ĉiam bone solvis ilin. Oni promesis diskuti la menciitajn problemojn. Ni vizitis ankau la radiostacion, kie oni surbendigis 4minutan prelegon en Esp-lingvo de C. Murgin kun la promeso, disaŭdigi ĝin en la proksima relacio de "Radio-novajoj".

KUNVALD v Čechách, lernejdirektoro M. Houdek prezentis ĉi tie la japan. diafilmojn "HIRŜISIMA" kaj "INFANOJ DE L'ATOMBOMBO". La samaj nun prezentigas en Běhánky-Lázně Teplice pere de k-do ing. B. Guttman. Pli detalaj informoj ankoraŭ nin ne atingis.

N I R T C E N Z A S

'ADAM MICKIEWICZ': dank al la sen-lacaj klopodoj de niaj polaj ĝoj-kamaradoj, fine la Komitato por Kulturaj Rilatoj kun Eksterlando komisiis la eldonejon "POLONIA" en Varsovio presi 78 pagan libron pri la vivo kaj verkoj de unu el la plej eminentaj verkistoj kaj poetoj en Polio, Adam MICKIEWICZ, verkitan de k-do. Mieczysl. JASTRUN. Krom la perfekta Esp-teksto la legantoj gvas bonege tradukitajn poemojn kaj orig. ilustraĵojn. La formato de la libro estas 15x20cm de luksa papero kun bela titol-pago. Mendebli ĉe: Asocio de Esperantistoj en Folio, Kozia 3, WARSZAWA. Prezo ne indikita.

"KIO ESTAS LA VERO?": libreto, bele en verda tolo bindita, kun ora enblendo sur la kovrilo. Grandeco: 18x13 cm. Ĝia aŭtoro MARTINUS el Danlando diras, ke la homoj satigis de religioj, kiuj stagnas, la pregejoj malplenigas. Oni sopiras al materiaj ĝonoj, sed oni ankau de tiuj satigos kaj serĉos la veron. Koni VERON, signifas scii, ki-o estas malvera. Tio signifas anon, kiun analizi kaj serĉi sciencoj signifas atingi pacon. Pensoj, kiuj memorigas unue pri hilelismo poste homaranismo de d-ro. Zamenhof

Serĉi pacon science, signifas serĉi ĝin aktive, do ne pasive, kiel kutimas la eklezioj. Tial por ni, pacdefendantoj, estas ankau ĉi tiu direkto bonvenigata, ĉar ĝi kontribuas al la fina tutmonda paco. Ĉi verko ampleksas 98 pagojn. Ĝin tradukis el dana originalo C. Graversen kaj kontrolis la Literatura Komitato de "SAT". Prezo, ne indikita. Mendebli ĉe: Spiritosciencia Instituto de Martinus, Mariendalsvej 94-96, KOPENHAGO, Danlando.

MUNICIO POR NIA BATALO

K-do. P. Bubík-Stonava..... 7.-Kĉs  
 K-do. K. Janda-Králupy n/Vlt. 2.- "  
 K-do. J. Kotek-Bratislava... 2.- "  
 K-do. J. Skála-Plzeň..... 10.- "  
 Akceptu nian sinceran dankon!  
 Vidu pagon San! Al tiu ĉi n-o.  
 ni aldonas poŝtpagilon. Pagu rap.

-----  
 Eldonis: Závodní klub ROH-odbor ESPERANTO, TATRA, n.p. KOPŘIVNICE, ĈSR.  
 Redaktis: k-do. Rudolf BURDA, Palackeho nám. č. 6, PLZEN, Ĉeĥoslovakio.  
 -----